

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

F. Nooljan

UNIVERSALA KULTURO

*Cu ĉi-tagoj de turmentoj
venis veki el dormado
la animon de l'homaro,
veki ĝin al vera vivo?*

(La Nica Literatura Revuo, p. 192).

Rabindranath TAGORE, granda hinda verkisto kaj filozofo, Nobel-premiito, iniciatis sintezon de eŭropa kaj aziaj kulturoj. Tial li vojaĝis tra Eŭropo, estis ankaŭ en Zagrebo, kie li parolis antaŭ multnombra elektita publiko. Dum du semajnoj, en Junio 1921, li estis gasto de germana filozofo Hermann KEYSERLING, verkisto de la « *Tagebuch eines Philosophen* » (Taglibro de filozofo) kaj fondinto de la « *Schule der Weisheit* » (Lernejo de la saĝeco). Lin mi vizitis en la jaro 1923 post la kongreso en Nurnbergo. Ni tiam parolis pri tio, sed mi ne volas nun citi lian opinionon. Estas certe, ke per disvastigo de Esperanto, universala lingvo, iom post iom ekestos ankaŭ universala kulturo.

Krom la ĉina, hinda, persa, hebrea, mediteranea kaj eŭropa kulturoj, ni devas konsideri ankaŭ la indigenajn kulturojn amerikan kaj afrikan. Sed ekzistas multaj nuancoj en ĉi-tiuj kulturoj. Ekzemple Jugoslavio apartenas al eŭropa kulturo, sed en ĝi ni povas diferencigi minimume ok diversajn nuancojn. Ĉiujn ili kontribuas al la grandioza sintezo - ili estas komponantoj, kiuj donos la rezulton.

Ĝis nun la esperanta literaturo apartenas preskaŭ esklude al la eŭropa kulturo, nur Japanujo iom influis ĝin. Kun tempo al ĝi aliĝos la aliaj kulturcikloj : ni ricevos tradukojn el iliaj literaturoj, iliaj adeptoj verkos originale en Espe-

ranto, per vojaĝado kaj personaj kontaktoj ekestos interkonatiĝo nun tute neimagebla. Ni ne pretervidu la korespondan literaturon. Jam nun esperantaj leteroj flugas de kontinento al kontinento per aerpoŝto. Mi korespondas jam pli ol tri-dek jarojn kaj inter la leteroj mi ricevis verajn perlojn de nia literaturo. Certe aliaj havas la samajn spertojn. Tiuj leteroj restos en tirkejoj, sed ilia efiko certe estas granda. Kelkfoje la korespondanto eĉ ne imagas, ke li donis al sia amiko netakseble valoran komunikon per iu simpla rimarko.

Ni ne povas antaŭvidi, kia estos tiu universala kulturo, sed la nunaj kulturoj fariĝos ĝiaj nuancoj same, kiel la brita, franca, germana, itala, rusa, usona, k.t.p. estas nuancoj de la eŭropa kulturo. La tasko de la instruistoj estos kolosa. Ne nur ke ili edukos la esperantistojn, sed ili zorgos, ke en la sintezon venu la plej bona el ĉiu kulturo ; ili edukos la verkistojn de la diversaj kulturcikloj al harmonia kontribuado por la tutmonda kulturo ; ili mem ankaŭ donos siajn proprajn kontribuojn de granda valoro.

La universala kulturo estos kreata iom post iom nerimarkeble. Ĝi estas kreata jam nun. La instruistoj devos esti konsciaj pri tio, por ke ili povu influu ĝin kaj doni la ĝustan direkton al ĝia evoluo. Eble ni povus antaŭvidi la programon por ĉi-tiu laboro. Pripensu tion, karaj gelegantoj !

La unua ero de la programo estos enkondukigi Esperanton en la lernejojn, kiel devigan objekton.

INFORMOJ

ESPERANTO EN LA GAZETARO

En « Skolske novine » n-ro 26 de la 29-VI-1956 prof. Mato Bojicević skribas, laŭ sciigo el nia revuo, pri la internacia infankongreso nun okazinta en Kopenhago dum 41-a U.K., kaj parolas pri pedagogia valoro de Esperanto. Doninte resuman historion de nia movado en la mondo ĝenerale kaj en Jugoslavio speciale li pledas por enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

NOVSPECA PREMIO

Okaze de la lernojarfino lerneja komitato de la klasika gimnazio en Zagreb (Jugoslavio) premiis samideaninon Zlata Gaberšek, lernantino de la 5-a klaso, pro bona konduto, laboro en junularorganizo kaj pro sukcesa gvidado de Esperanto-kurso al siaj kolegiinoj. Ni gratulas!

BLINDUL-KONGRESO

Dum la 41-a U.K. okazis la 26-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en la Blindul-Instituto de Kopenhago. Ceestis pli ol 125 partoprenantoj el 13 landoj. Krome okazis la dua Cef-Kunveno de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

INTERNACIA KONGRESO PRI LA « VIVANTA LATINO »

Gi ĵus okazis en Avignon. Laŭ privata letero de nia amiko LLECH-WALTER, se la raportoj estis parte latinaj, la diskutoj okazis nur nacilingve! Montriĝis granda intereso ĉe la latinistoj pri la interesa libroekspozicio organizita de S-ro RIBOT kaj lia edzino. Gratulojn al niaj tri samideanoj pro ilia bona inform-laboro.

NIA GRANDA FAMILIO

Al nia kunlaboranto P. BABIN naŝkiĝis la 21-an de Aŭgusto filino Benedikta, en nia kulturdomo de Gressillon. Gratulojn kaj bonfarton!

NIA GAZETARO

Estus eraro kredi, ke ekzistas nur niaj ŝatataj « Esperanto », « Heroldo » kaj aliaj bone konataj internaciaj aŭ eĉ naciaj revuoj.

Ciu devas almenaŭ scii pri la ekzisto de tuta serio da tre altkvalitaj revuoj, kies tasko estas servi nian kulturan movadon kaj spiti al ĉiuj Blinkenbegoj kaj aliaj ignorantoj de l'mondo. « La Nica Literatura Revuo » kaj « Norda Prismo », « Scienca Revuo » kaj « Medicina Revuo » estas jam brila vico al kiu

ni volas apartenigi nian I.P.R. kaj al kiu ĵus aldoniĝas la « Geografia Revuo » sub redaktado de nia ŝatata Tibor SEKELJ kaj eĉ tria literatura revuo : « Prometeo » eldonita en Japanio. Ni esperas baldaŭ pli detale raporti pri tiuj revuoj.

En la venontaj jaroj kaj jam nun ni devas lukti kaj venki aŭ pereji : tiom da energio dissternita tra la tuta mondo estas ja kuraĝiga.

MONDORGANIZOJ KAJ ESPERANTO

Ni ricevis de Esperanto-Grupo, Malagnou 52, Genève, sep belajn faldprospektojn en Esperanto publikitajn de gravaj mondorganizoj :

— O.M.S.O., la Organizo Monda de la Sano ;

— I.L.O., la Internacia Labor-Ofico ;

— M.M.O., la Monda Meteorologia Organizaĵo ;

— A.I.S.S., Asocio Internacia por Sociala Sekureco ;

— I.K.E.M., Interŝtata Komitato por Eŭropa Migrado.

Kaj krome de 2 svisaj transport-kompanioj :

— prospekto de la Aerkompanio : Swissair ;

— prospekto pri la Loetschberg-Fervojo.

Aliparte ni informas vin, ke nia U.E.A. prezentas nun al la publiko samstilan prospekton kiun ni varme rekomendas ĉefe por uzo dum la internaciaj neesperantistaj kongresoj. Seslingva, ĝi prezentas en kelkaj paragrafoj kion oni sciu pri la internacia lingvo ĝia literaturo kaj gazetaro, ĝiaj kongresoj kaj organizoj, ktp... Mil ekzempleroj kostas 4.000 fr. aŭ 40 nederlandajn guldenojn.

(Mendebla ĉe U.E.A. Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando).

La Redakcio kore dankas al S-ro P. KORTE el Veendam, kiu donacis ampleksan kvanton de la antaŭmilita I.P.R. kaj de la antaŭinta : « Novaj Tempoj ».

Sekve ni posedas sufiĉe multajn numerojn duoblajn, kiuj unuavice utilos por interŝange komplekti nian kolekton. Informiĝu ĉe la redaktejo : D-ro A. ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse. (Mankas al ni precipe : I.P.R. el la jaroj 1927 ĝis 1931 inklude ; kaj la unua jaro de « Novaj tempoj »).

J. J. Findlay

Esperanto kiel unua fremda lingvo

El la numero 11-12 de la 7-a jaro de I.P.R. (Nov-Dec 1928) ni ĉerpas la jenan artikolon. Origine ĝi konsistigis ĉapitron IX de la verko « Modern Language Learning » (Moderna Lingvo-Lernado) de J. J. FINDLAY, honoraria profesoro por Edukado ĉe la Universitato de Manchester. J. J. FINDLAY estis « kunlaboranto » de I.P.R. de T.A.G.E. kaj konsentis ke tiu ĉapitro aperu en nia antaŭmilita gazeto. F-ino Martha MOELKE ĝin tradukis. Pro la nova aktualo de la problemo ni opiniis ke ni devas reprodukti tiun tekston en nia nova I.P.R.

LA RAPORTO DE LA « BRITISH ASSOCIATION »

La aŭtoro konatiĝis kun Esperanto per tute unutona okazo. Dum multaj jaroj li estis membro de la « British Association for the Advancement of Science » kaj estis konata pro siaj esploroj rilate « Modernan Lernadon de Lingvo »; kiam la Asocio fondis Komitaton (Sekcio L.) por esplori la problemon de Internacia Mondhelplingvo taŭga esti akceptata de scienculoj, li estis petata fariĝi membro. Li interesiĝis kaj tuj aranĝis eksperimentan klason por instruistoj, kiuj, lernante la elementojn de Esperanto, povus fariĝi kompetentaj rilate ĝian valoron. Ĉi tiu prava kurso certigis la decidon de la Komitato de la British Association (1921). Nur en la nuna jaro (1927) la aŭtoro trovis vojon serioze okupi sin pri la esperanta problemo, kaj ĉi tiu malgranda volumo estas la rezulto de personaj spertoj dum la lernado de Esperanto. Ĝi prilaboras kaj multrilate plibonigas la spertojn, kiujn la aŭtoro kolektis dum la jaroj 1891-1892, lernante « die deutsche Sprache » en Germanujo.

Ĉi tiu fragmento de membiografio estas enmetita nur por trankviligi legantojn, al kiuj la ideo de eltrovita (1) lingvo estas neinteresa. Ekzistas ankorau multaj meditemaj personoj, kiuj opinias, ke Esperantismo estas amatora movado kaj ke iu ajn, kiu defendas ĝin, havas nekonfidindan, nekompetentan juĝon. Sed la « British Association » kaj ĝiaj Komitatoj ne estas obskuraj propagandistoj; la raporto, kiun oni prezentis al la Edinburga Konferenco, estis sufiĉe sobra kaj enuiga. Ĝi kolektis pruvmaterialon, kunmetis ĉiujn gravajn faktojn kaj, kun nur unu kontraŭa voĉo, prenis la partion de la lingvo kreita de Zamenhof. Intertempe la pruvmaterialo pliiĝis pri la fakto, ke Esperanto solvis problemon, kiun la mondo mokis dum du centjaroj.

« LA INTERNA IDEO »

Ekzistas sendube aliaj kaŭzoj por la akcepto de Esperanto ol tiuj, pri kiuj

ni interesiĝis kiel membroj de la British Association: estas, antaŭ ĉio, « la interna ideo » — la etika, humana sopiro, kiun Zamenhof prezentas al ni kaj kiel profeto kaj kiel lingva geniulo; sed ĉi tiu vidpunkto de internacieco restu ĉi tie sur alia flanko. La problemo de ĉi tiu libro estas, kiamaniere oni lernu fremdajn lingvojn. Esperanto ĉi tie interresas nin nur, ĉar ĝia strukturo donas al ĝi unikan rangon rilate la teknikon de lingvo-lernado; sekve la titolo de ĉi tiu ĉapitro.

Tamen, opiniante, ke la morala problemo apartenas al alia flanko, ni ne volas konstati, ke ĝi estu ignorata. Krom la motivoj, kiuj instigas al lernado, kaj por plenkreskuloj, kaj por infanoj, ĉi tiuj socialaj kaj moralaj rezultoj devas influi la efikon de instruo.

MALFACILAJOJ EN LA ELEMENTOJ MALALTIGITAJ AL MINIMUMO

Ni vidis en ĉapitro I, ke la neinstruita animo, kiu trovas en la unu gepatra lingvo sufiĉan instrumenton por la esprimado de pensoj kaj sentoj, rifuzas la akcepton de iu dua. Fakte, estis ĉi tiu fenomeno, kiu ĝis modernaj tempoj donis tiel grandan avantaĝon al instruisto, al komerca oficisto kontraŭe al la neinstruito, kiu povis paroli nur unu lingvon kaj kapa-

(1) Rim. de la aŭtoro: *La nura ideo de invento, rilate, lingvon, estas ne nur neinteresa, sed vere antipatia por multaj lernantoj. Sed la ideo de l'tempo pravas, ke ĉi tiu antipatio, kiel aliaj profunde sidantaj antaŭjuĝoj, baziĝas sur konvencio, kaj ne sur la naturo de la aĵoj en si mem; kaj ĝi ĉesas, kiam la studento ekkonas kaj kontrolas la iron de la evoluo en lingvo. Pro tio ke Zamenhof estis vere talenta inventulo, oni nun konsentu, ke li, kiel aliaj sukcesplenaj inventuloj, estis homo « naskita en ĝusta epoko ». Esperanto alvenis kiel evoluo, kiun nia epoko estis atendinta, evoluo ekstere de la etnaj lingvoj, al kiuj ĝi estas kompletigo. — (Ĉi tie sekvas noto nun ne plu aktuala pri IALA, tiam neŭtrala esplora instituto. — Red.)*

blis skribi neniun. Latino estis mistero. La franca kaj la angla estis provincaj, krudaj. Ne malmultaj scienculoj en altaj pozicioj deziras ankoraŭ en siaj koroj, reteni ĉi tiun malhumilan iluzion, ke ili estas heroldoj de mistero : ili ne havas kaŭzon timi la perdon de prestiĝo. La granda amaso de homaro ankoraŭ vivas en fazo de evoluo, en kiu loka dialekto kontraŭbatalas normalan nacian lingvon. Plua sukceso rilate la unuigon kun fremdaj nacioj per komuna ĝuo de fremda lingvo ne fariĝas en unu momento. Ili tamen devus studi ĉi tiun fenomenon de rezisto, ĉar sub ĝi parte kuŝas la malfacilaĵoj, kiujn la lernantoj devas venki, volante progresi, ĉu en la latina kaj la greka, ĉu en la franca kaj la germana. En ĉiuj ĉi lingvoj la opozicio, kiu malhelpas la eniĝon de iu ajn fremda lingvo, estas treege fortigita de la malfacilaĵoj, kiujn la lingvo mem prezentas en ĉiuj punktoj de « formo », priparolita en ĉapitroj III ĝis VIII. En unu la instruo pri formoj amuziĝas per malregulaĵoj, en alia la gramatiko eble estas simpla, sed la elparolado kaj la silabado ŝajne estas haosaj. La lernanto estas timigita, ĉar ŝajnas al li, ke li devas batali kontraŭ ĉiuj ĉi malfacilaĵoj kune. Ni montris, kiel la proverbo « Dividu kaj venku » estu uzata tiamaniere, ke li venku kelkajn el ili antaŭ ol la ceteraĵo atakas lin ; sed la plej bona por li estus malrapida progreso, kaj ni ne apartenas al tiuj, kiuj promesas rapidan akiron de la franca aŭ de la germana post du aŭ tri monatoj.

Nun la eltrovo de la mondhelpingvo ebligis rigardi la tutan problemon el nova vidpunkto. Oni zorgis pri gramatiko la plej simpla : kial povus esti alie, se la konstruo estas elpensita « ex machina » ? Ekzistas neniu esceptoj kaj malregulaĵoj. La vortformado estas egale klara kaj enhavoplena, uzante en siaj radikoj kaj finaĵoj la ekzemplojn de la ĉefaj eŭropaj lingvoj. La elparolado akordiga kun la ĝenerala eŭropa modelo, kaj ankaŭ ĉi tie ne ekzistas esceptoj. Silabado ankaŭ ne kaŭzas malfacilojn.

Do, se niaj infanoj, en la aĝo de dek jaroj, komencas lerni Esperanton, ili rapide sukcesas uzi ĝin vere kaj plezure ; iu, kiu ne fakte spertis, kion infanoj povas atingi pere de Esperanto (en kontrasto al ilia treege malrapida progreso rilate la francan) ne kapablas imagi, kion ĉi tiu diferenco signifas. La ĉefa afero estas, ke la opozicio malaperis : de nun la lernanto eniris la mondon de nacioj ; li parolas, ludas, pensas, sentas en alia lingvo ; kaj la aliro estas malfermata por li por ripeti la eksperimenton rilate la francan aŭ la rusan aŭ iun ajn nacian lingvon, kiu nun komencas vekti lian intereson. Eĉ se Esperanto havus neniun alian meriton, ĝia eltrovo estis valora, se nur por helpi al la instruistoj kontraŭ ĉi tiu malfacilaĵo !

HELPO RILATE GRAMATIKAJN IDEOJN

Krom ĉi tiu superstaranta avantaĝo estas aliaj kaŭzoj, kial Esperanto devus esti instruata dum unu aŭ du jaroj, antaŭ ol iu ajn nacia lingvo estas enkondukata en la lerneja studo-plano. Ni rimarkigis en ĉapitro V, ke ideoj de gramatiko, t.e. de universala gramatiko, plej bone estas prezentataj al la atento de la junularo dum la tempo, dum kiu ili lernas iun ajn fremdan lingvon, de kiam ekzistas absoluta kaŭzo por konsideri gramatikan fenomenon. Kaj ĉar la reguloj de Esperanto-gramatiko estas malmultaj kaj permesas neniujn esceptojn, la lernanto povas fiksi sian atenton al la ĉefaĵoj de universala gramatiko, ne daŭre memorante malregulaĵojn aŭ idiomajn uzadojn. Pro tio la propono, kiun ni faros en la sekvonta ĉapitro rilate la aranĝon de lernejoj tempo-tabeloj. Kiam paralela kurso estas aranĝata per (a) lerni Esperanton (kelkajn minutojn ĝis duona horo) ĉiutage, kaj (b) por studi gramatikon (kun ilustraĵoj de la angla kaj de la esperanta) unu aŭ du fojojn semajne, la lernanto fine de unu lerneja jaro estos sperta pri gramatikaj ideoj. Se li nun progresas al dua fremda lingvo, al la franca aŭ al la latina, li kapablos efike kontraŭstari la komplikojn de gramatiko kaj sintakso en ĉi-tiuj lingvoj, kun preparita spirito : ideoj de akordiĝo de kazoj, sekso kaj nombro, tempo kaj stilo, pronomoj kaj prepozicioj fariĝas parto de lia intelekta perfektigo. Ĉi-tio vere estas alia aplikado de la principo « Dividu kaj venku », al kiu ni aludis.

VORTARO DE ESPERANTO

La sama principo estas aplikenda ĉe la akiro de la vortrezoro. La granda amaso de Esperanto-vortoj kaj -radikoj estas de sama deveno kiel la latinidaj lingvoj kaj ankaŭ iomete devenas el germanaj fontoj. La sistemo de vokalaj sonoj estas ankaŭ « kontinenta » kaj treege helpas la anglan lernanton adapti sin poste al la pli artifika elparolado de francaj sonoj. Oni nomis (2) Esperanton « La latino de la demokratio » kaj ĉi-tiu eldiro vere bone taŭgas, ĉar ĝi montras la facilan elokventecon, kiu plimalpli metas la lernanton en kontakton kun la kondiĉoj, sub kiuj la nacioj de Eŭropo, reen irante la vojon ĝis al la suvereneco de la Roma Imperio, povas

(2) Rim. de la aŭtoro : *Tion faris la nun bedaurata Profesoro Mayer of Cambridge. La disvolvo de liaj ideoj pri Esperanto dum la Esperanto-Kongreso en Cambridge, 1907, malkaŝigis atentindan pruvmaterialon pri la helpfontoj de ĉi-tiu lingvo en la manoj de granda scienculo.*

akordigi sian heredaĵon kun la diversaĵoj de nacia historio.

Suprajaj kritikoj de la Esperanto-Movado ofte pretekstas, ke ĝi estas minaco kontraŭ la nacia literaturo kaj la nacia kulturo. Oni fakte suspektas, ke kelkaj instruistoj pri la franca aŭ la germana timas perdi sian laboron, kiam la tuta popolo enpenetros en la spiriton de Esperanto. Ili rigardas ĝin kiel konkuranton. Nenio povas esti pli malĝusta; ĉar ju pli ĉi-tiu movado disvastiĝas, des pli granda estos la postulo inter ĉiuj intelektuloj pri kompreno kaj komuna sento inter la nacioj. Ju pli la malamikeco de ŝovinismo malplimultiĝas, des pli la homoj provas konatiĝi pli intime kun la lingvo de la fremdulo, al kiu ili jam havis kvazaŭ provizorajn rilatojn per Esperanto, kiel mondcivitanoj. Esperanto sendube post malmulte da tempo atingos eminentan pozicion por si mem, nepre bezonata por internacia interparolado, kiel la sola neŭtrala platformo, sur kiu ĉiuj nacioj povas renkonti unu la alian kiel egaluloj; sed neniam ĝi povas anstataŭi la funkciojn de historiaj kaj literaturaj studoj, kiuj estas absolute kunligitaj kun la studado de la grandaj lingvoj, en kiuj la homa historio estas enfermita: Do, kiam instruistoj de Modernaj Lingvoj en lernejoj kaj kolegioj aligos Esperanton al sia instruplano, ili pligrandigos la valoron de ĉiu el la aliaj lingvoj, kiujn ili nun instruas, kaj samtempe helpas, ke iliaj lernantoj trovas novan rimedon por teknika laborkapablo dum la unuaj jaroj de studado.

UTILO POR LA INSTRUISTO

Al la nuna generacio de instruistoj Esperanto povas fari specialan servon, eĉ se ili ne havas la intencon, uzi ĝin kiel instrumaterion en siaj propraj lernejoj. La aŭtoro, kiel mi diris en la komenco de ĉi-tiu ĉapitro, ŝanĝis sian doktrinon pri lingvo-lernado dum li lernis Esperanton. Kiam nur unu ĉi-tie kaj tie, ĉu inter instruistoj, ĉu inter nefakuloj, konas unu vorton de ĉi-tiu lingvo, la lernanto povas veni al ĝi kiel novico. Li povas, kompreneble, fari la samon rilate la hispanan aŭ la italan, se li trovas saman fundon por suriri la ŝipon de unu el ĉi-tiuj lingvoj.

La plej bona vojo por iu ajn instruisto rilate iun ajn fakon de studo por progresigi sian pedagogian lertecon, vere estas, ke li komencu je la komenco per iu ajn arto aŭ metio, observante, kio okazos al li laŭ la klarigo de la koncerna psikologio — nova apliko de la proverbo « Lernu per faro ». Ni paroladas tro multe, ni provas tro malmulte. Se instruistoj akceptas ĉi-tiun konsilon, ili eble ne konsentos rilate ĉiujn vidpunktojn

kun la doktrinoj, mallonge skizataj en ĉi-tiuj ĉapitroj. Ĉar la aŭtoro ne fanfaronas pri neerarivo: prefere, li supozas, ke la instruistoj-studentoj, kiuj akceptas ilin, konservas malferman spiriton kaj faros siatempe, kion ili povas, por progresigi la teknikon de lernado. Unue, eble la specialistoj por Modernaj Lingvoj interesiĝos, ĉar ĝuste nun ili vere interesiĝas pri esploroj de la bazoj de siaj instrumentoj; sed oni fidus, ke ankaŭ aliaj instruistoj partoprenos la planon, ĉar la problemoj de metodo, prezentataj ĉi tie, tuŝas la fundamenton de eduka psikologio kaj rilatas ĉiujn lernejestudojn, kiuj koncernas la akiron de laborkapablo (3).

Tiamaniere la lernado de Esperanto estu proponata kiel nova studo al instruistoj, kiuj interesiĝas por memevoluo kaj profesia sukceso. Ofte oni riproĉas al la instruprofesio, ke ĝi estas indifera al progreso kaj studado, sed la kritiko ne scias, kiaj klopodoj estas faritaj kaj de edukaj aŭtoritatoj kaj de la instruistoj mem, por progresigi rilate teknikan laborkapablon: kie pesimismo estas konstatita, la motivo ĝenerale povas esti trovata en skeptikismo rilate la valoron de la prezentata speciala studadokemo. La publikigo de ĉi tiu malgranda libro estas mem respondo al skeptikuloj; ĉar eldonistoj ĝenerale ne eldonas volumon, antaŭ ol ili supozas, ke ĝi estos legata. La aŭtoro estas nur unu el la granda societo de instruistoj, kiuj estas preparitaj por esploroj, se ili vidas antaŭ si rektan vojon.

(3) Rim. de la aŭtoro: *El « Modern Languages », la organo del la « Modern Languages Association » de Granda Britujo kaj Irlando, ni citu: « La vero kompreneble estas, ke la tekniko de lingvo-studo neniam estis perfekta, kaj malmultaj el ni scias, ĉu tio kion ni deziras estas tio, kion ni devis deziri... Ĝuste estas diri, ke eĉ ne unu vidpunkto rilate la teknikon de lingvoinstruo estis science fiksita. » (« Editorial » p. 2 de Vol. VIII, numero 1, Oktobro 1926).*

FRANCAJ GVIDANTOJ KUNVENAS

La 9-an de Septembro 1956, okazis en Grésillon, la Esperantista Kulturdomo, kunveno, kiun ĉeestis kelkaj francaj esperantistaj asocioj; U.E.F., Katolikoj, Fervojistoj, G.E.E. Ĝin prezidis nia amiko Micard, prezidanto de la Esperantista kulturdomo. La reprezentantoj de la Asocioj pritraktis diversajn punktojn, kiuj interesas ĉiujn francajn esperantistojn;

La diskutoj disvolvigis en vere kamaradeca atmosfero. Kaj ni povas esperi, ke en la venonto, ĉiuj asocioj kunlaboros al la komuna celo: triumfo de nia lingvo Esperanto.

NI LERNU PER BILDOJ

Enkondukaj vortoj

N. d. l. R. — Post la rubriko « Por la Praktikantoj », ni opiniis, ke ni devas daŭre liveri al la lernanta parto de nia legantaro materialon por perfektigi en la lingvo.

Sekve, ni petis de S-ano A.D. Atanasov (Bulgario) krei kurson kiu sin turnus ankaŭ al la estonta instruisto de Esperanto kaj instigus lin per didaktikaj konsiloj. Tiu kurso komencos aperi en la venonta numero. La du unuaj lecionoj estos dediĉitaj al la tamen necesa gramatika revizio.

Sed ĉar tiu kurso estos sufiĉe altnivela ni petis S-anon P. Babin samtempe prezenti frazajn kaj bildan materialon.

Tiel I.P.R. esperas helpi ĉiujn samideanojn kiuj deziras gvidi kursojn ĉiujare pli laŭcelaj. Se eblos finance, ni poste aperigos la du verkojn libroforme. A. A.

Fakte oni ne intencas prezenti novan kurson sed nur serion de bildoj kun frazoj kaj demandoj. Nia celo estas helpi al la instruantoj pri la internacia lingvo.


Nia sperto montris al ni, ke ofte mankas al la kursgvidantoj simplan materialon por instrui la lingvon. Kompreneble ili ĉiuj scipovas la lingvon kaj la gramatikon. Sed la lernantoj, infanoj kaj eĉ plenkreskuloj jam forlasintaj la lernejon, bezonas konkretan simplan materialon por pli facile alktutimiĝi al la lingvo. Tiun simplan materialon ni intencas disponigi al vi. Ni neniam parolos pri gramatiko.


Unue la bildo ilustras simplajn vortojn. Due tiuj vortoj estas uzataj en simplaj frazoj, kiuj ĉiujfoje entenos novajn gramatikajn formojn. Trie, ilustritaj ekzercoj alktutimigos la lernantojn al la konstruado de simplaj frazoj kaj poste eĉ de simplaj tekstoj.

La verkinto nur proponas al vi tiun materialon. Bonvole sciigu al ni vian opinion kaj viajn sugestojn.

P. BABIN.

EN LA MANGOCAMBRO






- | | |
|-----------------|------------------|
| 1 — la tablo | 7 — la glaso |
| 2 — la seĝo | 8 — la botelo |
| 3 — la telero | 9 — la plado |
| 4 — la forko | 10 — la kaserolo |
| 5 — la kulero | 11 — la bovlo |
| 6 — la tranĉilo | 12 — la kruĉo |

1. — La telero,, la forko, la kulero, la tranĉilo, ktp., estas sur la tablo.
2. — La supo estas en la telero.
3. — La kafolakto estas en la bovlo.
4. — La vino estas en la botelo.
5. — La viando estas en la plado.
6. — La akvo estas en la kruĉo.
7. — La teleroj, la forkoj, kaj la kule-
roj estas sur la tablo.
8. — Patro sidas sur la seĝo.

DEMANDOJ


Ĉu la telero estas sur la tablo? Jes, la telero estas sur la tablo.

Ĉu la patro sidas sur la tablo? Ne, la patro ne sidas sur la tablo.



EKZERCOJ

Kompletigu la frazojn kaj respondu la demandojn :



- La supo estas en la —.
 La viando — en la plado.
 La telero — la plado estas — la —.
 Ĉu la supo estas en la plado?
 Ĉu la viando estas en la supo?
 Ĉu la plado estas en la telero?
 La vino estas en — —.
 La vino — estas — en la glaso.
 La telero — estas — la tablo.
 Ĉu la vino estas en la glaso?
 Ĉu la plado estas sur la tablo?
 Ĉu la vino estas en la botelo?
 La kafolakto — en la —.
 La kulero estas — — tablo.
 La kulero, — la forko estas — la tablo.
 Ĉu la tranĉilo estas sur la tablo?
 Ĉu la vino estas en la bovlo?
 Ĉu la kulero estas en la bovlo?
 La patrino — sur la —.
 La kruĉo — — estas sur la seĝo.
 La — estas en la kruĉo.
 Ĉu la patrino sidas sur la tablo?
 Ĉu la kruĉo estas sur la tablo?
 Ĉu la akvo estas en la kruĉo kaj en la
 glaso?



Nia Diskutejo

« Nia Diskutejo » estas libera tribuno malferma al ĉiu, kiu volas nur kelkvorte prir marki, apogi aŭ male kritiki la artikolojn aperintajn en I.P.R. En « Nia Diskutejo », ni amike, afable kaj tute libere esprimas nian vidpunkton.

PUNI AU NE PUNI ?

Kiam mi komencis mian instruon en lernejo, mi tute malsukcesis. Miaj lernantoj dancis sur mia nazo, kiel oni diras en la germana lingvo. Mi estis plena de amo kaj toleremo al la junuloj, kaj legis multon pri la malfeliĉaj geknaboj kiuj tiom suferis de la kruelaj instruistoj, ke mi ne sciis, ke la knaboj estas multe pli kruelaj ol la instruistoj. Se ili sentas nur bonkorecon, ili revolucias. Kaj kiam mi ricevis la unuan oficon, mi punis la unuan ĝenanton, kaj de tiu momento la lernantoj estimis min, kaj de tiam mi povis esti milda kaj bonkora, kaj mi estis ŝatata kiel bona kaj justa instruisto, kiu nur tre malofte punis. Povas esti ke ekzistas homoj, kies persona influo estas tiom forta, ke la junuloj ne faras la fortoprovon, kaj povas esti, ke la generacio, kiu estas edukita jam hejme al nobleco, agos alie. Sed ĉar la diritaj influemaj homoj estas nur malmultaj kaj ne sufiĉas por plenigi la necesajn instruoficojn, estas danĝere deklari la punojn pedagogaj pekoj, kaj faligi multajn junajn kolegojn per tio.

David TACHANER,
el Israelo.

VIVJESEMO (Vd. I.P.R. p. 81)

Sinjoro Redaktoro !

Mia malfeliĉa artikolo pri « Sugesto en la Klasĉambro » jam vekis multe pli da atento ol ĝi meritis, sed mi permesas al mi peti la okazon klarigi unu aferon. Sinjoro BOYET sarkasme uzas mian eble ne sufiĉe klaran terminon « vivjesa sinteno » por krude egoisma sinteno ; kaj tiu tute ne estas mia intenco. Por mi, homo kiu mistraktas alian homon montras, tiam, vivnean sintenon, ĉar vivjesemo inkluzivas la kapablon ami, esti justa, deziri bonfari k. t. p., kaj enhavas iom de la « respekto al la vivo » de Albert SCHWEITZER. En Britujo, kie puritanismo estas nacia malsano, ni ofte malsufiĉe atentigas la normalajn kaj senofendajn dezirojn de la ĝelernantoj ; mi mem tiel edukigis, ke dum multaj jaroj mi kredis ke ĉio, kion mi deziras, estas malbona, kaj komencis vere vivi nur dum mia 30-a jaro ; sed kiam mi diras « vivjesa » mi tute ne intencas diri « egoisma » aŭ malmorala ». Venĝo, krueleco, detruemo, malamo, mallaboremo, estas vivneaj kiel puritanismo.

Pardonu ke mi ĝenas vin ; sed ĉiuj instruistoj scias ke sarkasmo tuj provokas al ribelo, kaj mi volas havi la reputacion esti kontraŭpuritana, jes, sed ne kontraŭmorala !
Marjorie BOULTON.

POR LERNEJA LIBRO PRI HISTORIO DE LA POPOLOJ.

Multaj esperantistoj estas universalistoj. Por respondi tiun universalisman emon, mi

proponas al ĉiuj esperantistoj el la mondo verki lernejan libron pri historio de la popoloj, tian ke niaj gefiloj aŭ genepoj povus legi, se la popoloj konsistigus unu nacion. Efektive necesas eliri el nia naciaĉa konkono kaj proponi al niaj gefiloj historian vidon de la mondo.

Jen tiuj proponoj :

1. — Tiu libro, esperante verkita, koncernos infanojn de mensa aĝo de 10-11 jaroj. Poste, ĝi povos esti tradukita en ĉiun lingvon.

2. — Ĝi donos sinoptikan vidon super la historio de homoj kaj popoloj. Do, ni adoptos sinoptikan kronologion, ekzemple tiun de Elizeo Reclus, kiu proponas kiel debuton la unuan rekonitan eklipson ; tio permesas klare ŝtupigi la diversajn civilizojn (tiel, la eltrovo de Ameriko fare de Normandoj datus de 12.542). Ĉiu dato tiamaniere elektita estus parenteze sekvata de la dato kutime konata de la infanoj en iu lando.

3. — Ĉiu partoprenanto, atentante ke li sin turnos al 10-11-jaraj infanoj, donos pri sia lando, laŭeble :

a) mallongan geografian priskribon kun karto (ĉu necesas fiksi normojn ?).

b) klaran historian resumon : unu paĝo tajpita 21 x 27 por unu miljaro, akompanata de kelkaj koloraj fotoj, reproduktaj aŭ desegnoj.

c) simplan tekston priskribantan infanojn kaj ilian familian vivadon.

Se tiu projekto komencos prosperi, ĉiuj kontribuoj estos registritaj en interna bulneto sendota al ĉiu partoprenanto. Se pluraj partoprenantoj de sama lando sendos dokumentojn, ili interkonsentos por prezenti unu solan tekston kaj unu solan elekton pri la karto kaj la bildoj.

Se tiu projekto okazigos eldonon, ĉiuj partoprenantoj estos ĝiaj kunautoroj kaj eventuale ĝiaj kuneldonantoj.


Sendu ĉiujn viajn sugestojn al Johano PIGNERO, esperantista mondĉivitano, Crisnoy, Seine-et-Marne, Francio, kiu deziras kolan, solidaran, universalisman kunlaboron.

KONGRESOJ 56 KAJ 57

La 41-a Universala Kongreso okazis en Kopenhago kun 2.300 partoprenantoj el 44 landoj. La 42-a okazos en Marsejlo (3-10 Aŭg. 57).

La 29-a S.A.T.-Kongreso okazis en Beogrado kun 600 partoprenantoj el 19 landoj. Roterdamo vidos la 30-an de 3 ĝis 9 Aŭg. 57.

Multaj aliaj kongresoj, renkontiĝoj kaj kursoj okazis pri kiuj ne eblas al ni raportii : Vidu vian kutiman Esperanto-Inform-gazeton.



Unuope ricevitaj verkoj estas menciataj, duope - recenzataj. Ĉiu recenzanto liberas siajn dirojn, pri kiuj la Redakto ne respondas.

LUDILOJ, DUA A.B.C.-LIBRO. Strofoj de Nenjo Rimanto, bildoj de Brian Les-Eld. British Esperanto Association. x 15.

Jen lego-libreto por niaj junaj esperantoj. Jam unua libro (A.B.C.-libro de la aŭtoroj) kutimigis ilin al la literaturo; ili memoras la belajn bildojn de la aŭtoroj kaj ĝangalaj. Ili scivolos la novaj desegnoj kaj iom rekonos la aŭtorojn. Se ili tute memoras, tiam ili vereziĝos al silabado... La litertipoj estas pli malgrandaj, pli premitaj ol tiuj de la unua libro. La infaneto grandiĝis. Ankaŭ pro tio la dua libreto aspektas pli serioza. La desegnoj ĉiam estas samplaj, malpli grandaj, pli komplikaj, pli « aerumitaj ». Ankaŭ la temo de la desegnoj igas pripensi. Vidante ranon, komar, infano ne serĉas : temas pri la raneto. Sed vidante elefantojn kaj girafojn apud barko kun kajuto, vidante zonojn aŭ lignajistajn ilojn, ĝi hezitas : ĉu besto aŭ ludilo ? Ĉu la instrumento, besto de plenkreskuloj aŭ ileto por amuzi infanojn ? La infaneto bezonas pripensi : ĝi devas esti iom pli aĝa por kompreni ; kelkfoje, la desegno prezentas la ludantojn apud la ludilo, tio helpe tuj kaj pravigas la titolon de tiu dua libreto : « Ludiloj ».

Ne ĉiuj desegnoj plaĉas al mi. Ekzemple : Soldatoj, laŭ mi, ne estu ludiloj de infanoj. Jaĥeto sendube volas paroli pri la literon h ĵus prezentitan kiel malofte uzata... en libro infana negrafero »... Sed, por infano ĝi estas tro ŝipeto aŭ velŝipo. Ĝi estas eble ĝenerale trovaĵo, sed ĉu krio de bebo ? prefere de hundo.

Se la desegnoj estas por pli grandaj infanoj, ankaŭ la teksto. Sed iom tro simplaj, naivaj aspektas tiuj versoj. La bildoj estas tro ofte bonaj kaj belaj. La aŭtoro iom mistaksas la kapablon de la infanoj kaj denaske esperantistaj etuloj. Kvankam ili posedus nur tre elementan vortovivon.

Ofte rediris al ni buberneja inspekto : « Eble pli bone ol ni, la infanoj pablas senti altan arton. Ne timu liveri ĝin ĝi malfacilan ĉefverkon. Multon ĝi ne komprenos, sed la tuto tamen ĝojigos ĝin kaj ricevos ĝian intelekton. »

Kompreneble, tiu libreto turnas sin ankaŭ al freŝbakitaj esperantistetoj ; tiam ĝi sufiĉas : Se multaj gepatroj timis eduki siajn infanojn dulingve, ili profitu tiun okazon por ŝtopi tiun breĉon. Ankaŭ ĉi-cele ambaŭ libroj helpas ilin.

Mia fina impresio, konfirmita de la reagoj de filĉjo : agrabla libreto sed pli plaĉis la unua.

Helena ALBAULT.

DIALEKTO, DIALEKTIKO de Delfi DALMAU. Barcelono, 1956. 88 p. 12 x 16. Broŝ. Eldonis : Belpost, Apartada 5164, Barcelono.

Jen kolekto de 21 artikoloj plejparte aperintaj en diversaj niaj gazetoj el la pluma de nia ŝatata Barcelona Akademiano (La lastan vi ŝatos relegi en « Esperanto » de Majo 56).

« Dialekto » la aŭtoro nomas la dirmanieron, la parolmanieron, propra al ĉiu, fuŝulo aŭ eminentulo : kiom da kappoj, tiom da « dialektoj ». Tio veras kaj por la naciaj kaj por la internacia lingvo. Sensece estas batali por la propra lingva opinio : la lingvo estas sumo de « dialektoj », sumo de la diversaj parolmanieroj kaj ĝi evoluas el la plej bonaj elementoj de ĉiuj el ili.

La verko estas plektita de diversaj pensoj pri la interna ideo, la rolo de ZAMENHOF, filozofo kaj poeto, kaj pri la signifo kaj estonto de Esperanto, « natura neŭtrala lingva fundamento » kiu ebligas krei tutmondan civilizon el kiu estos eskludita ĉiu « imperia spirito ».

Filozofe serena kaj serene filozofa impresas tiu priesperanta verketo kiam oni komparas ĝin al lastatempaj verkoj aŭ diskutoj-disputoj de diversaj eminentuloj-esperantologoj. Ĉi-tiuj ofte donis spiritoron detrueman pro skeptikismo, troa plibonigismo, ekstremigo de la ideoj, troa ŝato de tro striktaj reguloj, logikaj aŭ ne... Kun Delfi DALMAU ni lernas profundan lecionon : ne nur homoj malsamas sed ankaŭ iliaj parolmanieroj. Ni saĝe kaj konscie allasu ĉiun el ili kiel elementojn de nia ĉionampleksa lingvo. Ĉiu el ni strebu al kiel eble plej per-

fino sur paĝo 95.

GRAJNOJ EN VENTO

Plej granda deziro de ni ĉiuj estas, ke Esperanto disvastiĝu kiel eble plej rapide tra la mondo. Ni ne tro kalkulu pri la oficiala helpo de la registaroj. Ni organizu mem nian informadon, pruvante per faktoj la taŭgecon de Esperanto kiel internacia lingvo.

La entrepreno « Grajnoj en Vento », tutmonda interlerneja rondo, prezentas realistan proponon tuj efektivegeblan por disvastigi ESPERANTON inter la infanoj, kaj pere de la infanoj inter la plenkreskuloj :

Ciu sindona instruisto aŭ profesoro, ĉiu agema Esperanto-klubo partoprenu en unu el la interlernejaj rondoj « Grajnoj en vento » !

Kio estas rondo « Grajnoj en Vento » ?

Ĝi estas aro de 12 klasoj (el 12 landoj), kiuj unuiĝas kaj decidas eldoni en la nura lingvo Esperanto komunan gazeton konsistantan el la verkoj de siaj gelnantoj :

— tekstoj pri la reala vivo en sia hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, regiono, lando ; pri la kutimoj, la ludoj, la festoj, ktp., ktp.

— desegnaĵoj.

— bildoj kaj fotoj.

— prospektoj.

— sekigitaj floroj, ktp.

(Ne necesas, ke la lernantoj sciu Esperanton : la instruisto mem tradukas tiukaze).

La iniciatanto de la rondo ricevas la kontribuojn de la 12 klasoj kaj resendas ilin al la partoprenantoj, en la formo de interklasa gazeto. La gazeto estas internacia, tre interesa, unika en la mondo !

La rondo « Grajnoj en Vento n-ro 1 » tre bone funkcias, kaj ĉiuj partoprenantaj lernantoj kaj instruistoj, same kiel la gepatroj estas entuziasmaj.

Vi kunlaboru kun ni al la kreado de multaj novaj rondoj ! Ni kovru la terglobon per la rondoj interlernejaj « Grajnoj en Vento » !

De diversaj flankoj oni proponis, ke la rondo « Grajnoj en Vento n-ro 1 » fariĝu centro tutmonda kaj kolektu la adresojn de ĉiuj interesuloj, kiuj deziras rapide kaj malmultekoste organizi novajn rondojn. Ni akceptas ĉi tiun taskon kaj plenumos ĝin, almenaŭ ĝis la afero estos progresinta kaj funkcios per si mem, kaj krome kondiĉe, ke ĉiu skribanto aldonu

internacian respondkuponon al sia sendo : efektive, en Svislando, kiel ĉie en la mondo, instruisto — despli se li havas familion, — ne estas riĉulo.

Bonvolu pripensi la gravecon de nia entrepreno por la movado :

— Per la infanoj ni disvastigos Esperanton tra la mondo.

— Per Esperanto viaj lernantoj amikiĝos al infanoj de aliaj landoj.

— Pere de la infanoj vi laboras por la Paco sur la Terglobo.

Se vi interesiĝas pri nia afero, bonvolu respondi al la jenaj demandoj : 1. Via nomo ; 2. Via adreso ; 3. Speco de via klaso : elementa ? duagrada ? seminaria (estontaj instruistoj) ? gimnazia ? (tiu demando n-ro 3, por ke ni povu kunligi kiel eble plej bone samkvalitajn klasojn) ; 4. Aĝo de la lernantoj ; 5. Knaĵoj ? knabinoj ? geknaĵoj ? ; 6. Ĉu vi akceptas fariĝi centro (iniciatanto) de nova rondo ? ; 7. Ĉu vi deziras fariĝi kunlaboranto (ordinara membro sen speciala respondeco) ?

Ni ĉiam respondos al viaj leteroj, sed vi devos kelkafoje atendi, ĝis ni havos la eblecon kontentigi vin. Rondo ne povas esti kreata en kelkaj semajnoj : tia kreo postulas kelkajn monatojn.

Jen kelkaj klarigoj, kiujn nia sperto montris nepre necesaj por la glata funkciado de internacia rondo :

1. *La formato* de la folioj sendataj al la « centro » estu ĉiam 21 x 29,7 cm.

2. Ĉiu infana verko estu mane skribata aŭ maŝine multobligata je 20 ekzempleroj, ĉar ĉiu kvarmonata eldono konsistas el 20 kajeroj :

a) 12 por la partoprenantaj klasoj en la 12 landoj,

b) 1 par U.E.A.,

c) 1 por S.A.T. (ambaŭ organizaĵoj kunlaboras al la rondo),

d) 1 por Internacia Esperanto-Muzeo en Wien 1, Hofburg, Aŭstrujo,

e) 1 por Unesco, Departemento pri Edukado, 19, rue Kléber, Paris 16^e, Francujo,

f) 3 por etendi la entreprenon al la tuta mondo,

g) 1 por la centro en Svislando.

3. Oni sendu, almenaŭ komence, nur 3-foje en unu jaro, nome por la : 1-a de Marto, 1-a de Julio, 1-a de Novembro.

4. La iniciatanto prizorgu la kovrilan
ĝon, eventuale antaŭparolon.
5. Rezervu ĉiam 3-centimetran spacon
n skribo ĉe la rando de agrafado, kaj
centimetron ĉe la alia rando.

5. La Internacia Poŝta Regularo rajti-
s la lernejojn sendi siajn laborojn :
stojn, desegnaĵojn, ktp., laŭ tre mal-
telekosta tarifo. Petu informojn pri tiu
erese ebleco.

6. Ĉiu jaro la membroj de la rondo pagas
ĉiujare al la centro 3 x 2 internaciajn
pordkuponojn, alie dirite 6 respon-
dopojn.

Bonvolu noti, ke la pedagogiaj gazetoj
internaciaj « Esperanto kaj Kulturo, In-
ternacia Pedagogia Revuo », 11, rue des
Millants, Toulouse, Francujo, kaj « In-
ternacia Letero », Skonertg. 1 Goteborg
Svedujo, tre favore atentigas niajn klu-
dojn, kaj volonte akceptas viajn arti-
kolojn pri la tutmonda entrepreno « Graj-
noj en Vento ».

Nian alvokon, presitan je 500 ekzem-
plaroj, ni adresas ne nur al instruistoj,
sed ankaŭ al Esperanto-kluboj kaj izolul-
oj : ili fariĝu perantoj ĉe klasoj en kiuj
instruisto ankoraŭ ne estas Esperan-
tisto.

Estimataj samideanoj ! Ni firme espe-
ras, ke multaj el Vi sendos sian aliĝon
la tutmonda interlerneja rondo « Graj-
noj en Vento ». Ni tre ĝojos pri tio. Vi
ĉiuj havos multe da plezuro en Viaj
artikoloj interŝanĝoj.

Marcel ERBETTA.

Adreso : Tutmonda interlerneja rondo
« Grajnoj en Vento », rue des Pins, 66,
Senne-Biel 7 Svislando.

lastminute

Jam respondoj venis

Efektive jam kvin kolegoj anoncis sin por
esti « iniciatantoj » de novaj rondoj « Graj-
noj en Vento » n° 2, 3, 4, 5, 6.

Ili estas : Zlatnar Svobodan el Ljublja-
na (gimnazia rondo) ; van Denzen el Neder-
lando (seminaria rondo) ; Angot el Ile
d'Oléron, Francujo ; Košutić el Zagrebo kaj
Mussier el Tréteau, Francujo (la tri lastaj
por elementaj rondo).

Sed tio ne sufiĉas : en ĉiu rondo devas
esti, krom la « iniciatanto », dekunu aliaj
anoj el dekunu landoj. Rapide anoncu vin
ĉe la supra adreso. Nepre aldonu respon-
doponon.

Annoncetoj

AKADEMIANO IVAN H. KRESTANOV
(unu peranto nia por Bulgario) Ul. 6
Septemvri, 2. Sofia, — (kies tuta libraro
kaj gazetaro forbrulis dum la militbom-
bado en 1944) reverkante laŭmemore la
manuskripton de sia cigna kanto « *Tra
Eŭropo per Esperanto* » — ilustritaj vo-
jaĝnotoj kaj impresoj dum sia 50-jara
E-vivado petas kontraŭpage aŭ interŝan-
ĝe malnovajn E-Gazetojn. Laŭeble regis-
trita sendo. Dankon!

Ekspozicion el Infandesegnoj deziras
aranĝi Vago Imre, instr. en Pecs, Rudas
Laszlo - 7 u-21. Hungario.

ur vian Librobreton

fino de paĝo 93.

ta lingvaĵo ; sed nepre ne kredu, ke
le al tiu perfektigo nur la personaj
voj taŭgas, kaj ankoraŭ malpli ne ba-
u, ne sterile batalu, kontraŭ ĉiuj, kiuj
sekvas vian personan vojon... Tio ja
eskludas defendon de la propra vid-
punkto.

Ankaŭ Delfi DALMAU — memkompre-
ble — havas sian propran « dialek-

ton » ; sian propran parolmanieron. Ek-
zemple, plej evidente, li tre ŝatas la du-
oblajn duopojn ; ni citu : « *genia homo
kaj homa genio* » aŭ « *lumigaj plezuroj
kaj plezuraj lumigoj* ». Tio certe ele-
gante ornamas.

« *Dialekto, Dialektiko* » tre certe es-
tas rekomendinda por ĉiu serioza espe-
rantisto. Krome, ankaŭ pro la aldonitaj
demandoj ĝi bone povus utili fine de su-
pera kurso kiel enkonduko, kiel inico,
al diversaj problemoj esperantologiaj.

Andreo ALBAULT.

Ĉiu abonanto trovu novan abonanton !

Kiu tuj abonos por 1957, tiu senpage kaj krome ricevos la tri lastajn
numerojn de 1956.

Nolu ke la antaŭaj numeroj de I.P.R. estas elĉerpitaj.

Distra Paĝo

KONKURSO

8-a konkurso. — Gajnintoj : F-ino Caubel, S-ro Caubel, S-ro Chazal, F-ino Deygas, S-ino Lemoine, S-ro Rochery, S-ro Vivien gajnis 2 poentojn.

F-ino Gudula Thenee gajnis 1 poenton.
Gratulojn al ĉiuj.

Post tiu konkurso S-ro Trépier gajnis 300-frankan libron ; S-ro Vivien gajnis 330-frankan libron.

Ni kore gratulas la du gajnintojn.

9-a konkurso. — Jen la solvo : latuno, ĉelo, fagoto, demono, volano, demarŝo, horo, moruo, jesi, stablo, asizo, nepra, majoliko, luko, tifo, lieno, rebuso, cikado, precipe, okcidento, epitafo.

« La ĉefa devo de homoj estas ne malutili reciproke ».

Gajnintoj : S-ro Caubel, S-ino Beillier, S-ro Chevalier, S-ro Couwenberg, Ges-oj Lanz, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, F-ino Texier, S-ino Villette gajnis 2 poentojn.
F-ino Arnould, S-ro Bourry, F-ino Caubel, F-ino Deygas, S-ro Letendre, F-ino Robin, F-ino Thenee gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn.

10-a konkurso. — Jen la solvo : voluto, ozeno, retoriko, togo, oazo, jaguaro, najlo, ŝpuro, pado, aŭkcio, regento, ulesko, agresi, glisilo, opero, justa, naso, fajna, aŭtogiĝo, regolo, uverturo.

« Vortojn ŝparu, agojn faru ».

Gajnintoj : F-ino Arnould, S-ino Beillier, S-ro Bourry, F-ino Caubel, S-ro Couwenberg, Ges-roj Lanz S-ino Reyneau, F-ino Robin, F-ino Texier, F-ino Thenee, S-ino Villette gajnis 2 poentojn.

S-ino Pallard, S-ro Vivien gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn gajnintojn.

UNUA KONKURSO 1956-1957

KRUCVORTOJ

Horizontale :

1. Kiel oni povas mezuri sen aparatoj.

2. Pagilo ; Havi efektivan rezulton (r).

3. Cielkolora (r) ; Esperanta litero ; Multe da fojoj (r).

4. Esperanta litero ; Ruiniĝi ; Du samaj vokaloj.

5. Meza parto de la maldika intesto.

6. Montri preferon.

7. Inverse : konjunkcio ; Inverse : spirebla gaso ; Nedifina adjektivo.

8. Komenco de fino ; Inverse : esperanta litera ; Fonetike : spirita atmosfero.

9. Mallonga rimarko ; Inverse : transigi en difinitan lokon.

10. Propraĵo.

Vertikale :

1. Estanta en ombro.

2. Parto de la korpo ; Inverse : pastro.

3. Numeralo ; Prepozicio ; partcipa finaĵo.

4. Esperanta litero ; Besta haŭto ; flava metalo (r).

5. Kunigaĵo de paperfolioj.

6. Inverse : ameleca pulvoro.

7. Kapo de zebro ; Partcipa finaĵo ; Inverse : pronomo.

8. Senkapa nokta rabobirdo ; Inverse : nedifina pronomo ; malgranda.

9. Enmara danĝera roko ; Inverse : vivege puŝi.

10. Videbla emanajo de psika origino.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2					■	■				
3				■				■		
4			■						■	
5	■									■
6	■									■
7			■					■		
8				■						
9					■	■				
10										

Sendu viajn solvojn al : S-ro GUILLOT, profesoro, Cours de la 4^e République, Gaillard, Hte-Savoie (Francujo), ĝis la 25-a de la venonta monato. Por ĉiu bona solvo vi ricevos 2 poentojn.

POR VIA DISTRO

Jen la solvo de la krucvortoj n° 6 :

Horizontale. — 1. Pampelmuso ; 2. RTIM, Izop ; 3. Ara, kt, Ido ; 4. Ga, Iros, Or ; 5. Kripto ; 6. Toporo ; 7. To, Stri, MN ; 8. Ilo, OO, Tie ; 9. Sent, Parc ; 10. Morfologio.

Vertikale. — 1. Pragmatism ; 2. ĵtra, Oleo ; 3. Mia, kt, ONR ; 4. PM, Iros, TF ; 5. Kripto ; 6. Toporo ; 7. Mi, Stri, Po ; 8. Uzi, OO, Tag ; 9. Sodo, Miri ; 10. Oportuneco.